



同  
話

# Mikrofone

7-a jaro • Januaro-Marto, 2009





## Redaktora mesaĝo

Estimataj legantoj! Nia kaj ankaŭ via kuriero "Mikrofone" fondita en 2003, ĉiam ricevas fortan subtenon kaj ĝuas vastan ŝaton de legantoj post sia apero.

"Mikrofone" estas jam fenestro, tra kiu viaj vortoj el letero kaj retmesaĝo karesas la okulojn de tutmondaj samideanoj.

Nun la distribua kvanto superas milon kaj centojn da ekzempleroj. En 2007 la kuriero fariĝis gazeto trimonata kaj, en la estonteco eble dumonata dank' al abundiĝo de viaj kontribuajfoj. Ni atendas vian pluan subtenon en la komuna redaktado!

Ja bonvenaj estas ĉiuj kontribuajfoj rilataj al nia disaŭdigo kaj la E-Movado. Ni kune deziru pli prosperan estontecon de nia Mikrofone!

# ENHAVO


- 3 Novjara mesaĝo de ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao
- 4 Nov-jara mesaĝo de Wang Gengnian, direktoro de ĈRI
- 5 Novjaraj saluto kaj bondeziroj el diversaj mondpartoj
- 6 Saluto kaj bondeziroj okaze de la Printempa Festo
- 7 **Informo el Ĉinio**  
Ĉinio firme batalas kontraŭ sekeco  
Ses proponoj de Hu Jintao por antaŭenpuŝi rilatojn inter du bordoj  
Ekstartis "tri kontaktoj" inter la du bordoj de la markolo Taiwan  
La du grandaj pandoj atingis novan hejmon en Taibei  
**Ĉinio difinis ekonomian kreskon je 8%**
- 10 **Intervjuo**  
Nia kara lingvo, al kiu ni kontribuas la tutan vivon!
- 12 Tra la Mondo
- 14 Cititaj Leteroj
- 15 **Mikronovelo**  
Verkisto kaj Knabino

Ĉi-jare 45-jariĝos la E-elsendo de Ĉina Radio Internacia. Celebre al la 45-jariĝo, ni okazigos artikolpeton kun la temo: "Mi kaj la 45-jara E-elsendo". Ni esperas, ke vi daŭre nin subtenos kaj kunlaboros kun ni kaj verkos ion impresivan, kortuŝan kaj neforgeseblan koncerne al la elsendo aŭ ion pri kontaktado kun nia Redakcio en la pasintaj pli ol 40 jaroj. Tio sendube estos ege utila por plibonigi nian estontan laboron. Eminentaj kontribuajfoj sinsekve aperos en nia Mikrofone. Ni atendas vian fervoran partoprenon!

Anticipan dankon!

Sinjorinoj, sinjoroj, kamaradoj, amikoj:

Baldaŭ sonos la novjara sonorilo kaj alvenos la jaro 2009. En ĉi tiu bela momento, plena de esperoj, mi tre ĝojas adresi, pere de Ĉina Radio Internacia, Ĉina Nacia Radio kaj Ĉina Centra Televid-stacio, novjaran bondeziron al la tutlanda popolo de ĉiuj naciecoj, al samlandanoj en Hongkong-a Speciala Administra Regiono, Aomen-a Speciala Administra Regiono kaj Taiwan, al transmaraj ĉindevenuloj kaj ĉinaj elmigrintoj kaj al diverslandaj amikoj



neŝancebleco, la grandan standardon de socialismo kun ĉinaj trajtoj, profunde efektivigos kaj praktikos sciencajn disvolvan koncepton, akcelos ekonomian ekvilibran kaj rapidan evoluon kaj persistos en la reformado kaj malfermo. Ni plifortigos socian konstruadon kun plibonigo de la popola vivo kiel ĉefaĵo kaj akcelos ekonomian kaj socian bonan kaj rapidan disvolviĝon. Ni persistos en la orientiloj pri "unu lando kun du socisistemoj", "hongkong-ana administrado de Hongkong", "aomen-ana administrado de Aomen" kaj alta aŭtonomeco kaj protektos, kune kun la vastaj amasoj de hongkong-aj kaj aomen-aj samlandanoj, la longedaŭrajn prosperon kaj stabilecon de Hongkong kaj Aomen. Ni persistos

tra la tuta mondo!

2008 estas neordinara jaro por la ĉina popolo. Ĉinaj popolanoj de ĉiuj naciecoj unuanime klopodis kaj sukcese venkis en neĝkatastrofo en la suda landparto kaj fortega tertremo en Wenchuan de la provinco Sichuan; sukcese okazigis la Pekinajn Olimpikojn kaj Paralimpikojn; sukcese plenumis flugadon de kunhoma kosmoŝipo Shenzhou n.7 kaj sukcese okazigis la 7-an Azi-Eŭropan Pintan Konferencon. La sinteza ŝtata forto de Ĉinio pluaparte grandiĝis kaj la popola vivo pliboniĝis. La ĉina popolo plifortigis interfluojn kaj kunlaborojn kun diverslandaj popoloj, kune frontis al seriozaj defioj, kia la internacia

financa krizo, kaj faris kontribuon por protekti la mondan pacon kaj akceli komunan disvolviĝon.

En 2008 la ĉina popolo solene celebris la 30-jariĝon de la reformado kaj malfermo kaj faris aranĝon pri kontinua antaŭenpuŝo de la reformado kaj malfermo surbaze de resumo de spertoj. Ĉi tie en la nomo de la ĉinaj registaro kaj popolo, mi esprimas sinceran dankon al diverslandaj popolanoj pro ilia granda subteno kaj sincera helpo en la kuranta jaro.

2009 estas jaro kun granda signifo por la ĉina popolo. Antaŭ 60 jaroj, fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko malfermis novan paĝon por la ĉina nacio. Ni alte tenos plu, kun firmeco kaj

## Novjara mesaĝo de ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao

en la fundamenta orientilo pri "paca reunuigo kaj unu lando kun du socisistemoj", firme tenos la ĉeftemon pri paco kaj evoluo de la dubordaj rilatoj, ĉiam senŝanceliĝe strebos por feliĉo de ambaŭbordaj popolanoj kaj paco en Taiwan-markola regiono kaj firme defendos la ŝtatan suverenecon kaj teritorian integrecon.

En la nuna tempo, la mondo estas en reformado kaj reguligado, tamen ĝenerale stabilas la internacia situacio, sed, samtempe, la internacia financa krizo rapide cirkulas kaj pli malrapidigas kreskado de la monda ekonomio, tial la homaro vizaĝas ankoraŭ al multe da malfaciloj kaj defioj. Estas ja komuna deziro de diverslandaj popoloj plifortigi internacian kunlaboron, kune trakti ĉiajn defiojn, protekti stabilecon de la internacia situacio kaj akceli komunan evoluon de diversaj landoj. Profite de tiu ĉi okazo, mi volontas reaserti, ke Ĉinio senŝanceliĝe iros sur la vojo de paca disvolvo, ĉiam senhezite praktikos malferman

strategion pri reciproka utilo kaj kuna gajno, klopodos plu por disvolvi interfluan kaj kunlaboron kun diversaj landoj, aktive aliĝos al klopodo de la internacia socio por trakti la financon krizon, sin dediĉos al akcelo de kreskado de la monda ekonomio kaj progreso de civilizacio de la homaro. Ni ankaŭ kune kun diversaj landoj de la mondo antaŭenpuŝos konstruadon de la mondo paca, kune prospera kaj harmonia.

En tiu ĉi momento ni tiom pli profunde zorgas homojn en la mondo, kiuj ankoraŭ suferas de milito, malriĉo, malsano kaj katastrofo. La ĉina popolo elkore simpatias al ili pro ilia mizero kaj volas helpi ilin laŭ sia eblo, ke ili frue liberiĝu el la malfeliĉo. Ni sincere esperas, ke ĉiuj landoj reciproke subtenos kaj helpos por kune akceli pacon, stabilecon kaj prosperon de la mondo kaj ĉiulandaj popoloj povos vivi pace kaj libere.

Fine, en Pekino, mi deziras al vi feliĉon kaj sanon en la nova jaro!



## Nov-jara mesaĝo de Wang Gengnian, direktoro de ĈRI

Karaj aŭskultantoj:

Baldaŭ eksonoros la nov-jara sonorilo por 2009. Nome de la kolegaro de Ĉina Radio Internacia, mi adresas al vi ĉiuj plej sinceran saluton kaj plej elkorajn bondezirojn! Mi elkore deziras al vi ĝojon kaj feliĉon kaj esperas, ke la mondo estos harmonia kaj popolo feliĉa!

La jaro 2008 estas neforgesebla. En tiu ĉi jaro, Ĉinio spertis multe da provoj kaj suferoj kaj ankaŭ gajnis pozitivajn taksojn kaj laŭdojn. La ĉina popolo suferis neĝkatastrofon, fortegan tertremon en Wenchuan. Aliflanke la ĉina popolo kune kun la monda, ĝuis gajan tempon de la Pekinaj Olimpikoj kaj Paralimpikoj. Sekve, Ĉinio donis al la mondo grandan ĝojecon pri plena sukceso de kunhoma kosmoŝipa flugado, bonvenigis 30-jariĝon de la reformado kaj malfermo kun mejloŝtona signifo kaj ankaŭ batalis kontraŭ internacia financa krizo sub atento de la mondo... Ĉinio gajnis brilojn per saĝo kaj kuraĝo, konkerinte defiojn. Historio atestas,

ke la jaro 2008 estas "ĉina jaro" kun la vera senco!

En la pasinta jaro, Ĉina Radio Internacia feliĉe partoprenis kaj atestis ĉiun gravan historian tempon, precipe partoprenis en raportado pri la Pekinaj Olimpikoj kaj atestis grandiozan historion en ĝojeco. Per raportoj pri la Pekinaj Olimpikoj, ni altigis efektivan forton kaj plivastigis influon. Ĉina Radio Internacia disvastigas harmonian koncepton iniciatitan de Ĉinio al la mondo, ke la mondo havu plej freŝan konon pri la nuna Ĉinio.

En la riĉrikolta jaro 2008 ni ricevis pli ol 2 milionojn kaj 700 milojn da leteroj el 161 landoj kaj regionoj de la kvin kontinentoj. En 2008 Ĉina Radio Internacia funkciigis 19 eksterajn retradiojn kaj kunlaboris kun 153 radioj.

La jaro 2008 estas jaro kun speciala signifo por Ĉina Radio Internacia. Ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao donis atenton kaj zorgon pri la radio. ĈRI Surlinie plene disvolvas sian superecon kaj senĉese plivastigas

sian influon kaj kovron. Nun ĝi estas komuna platformo de novaj mediatoj kun programoj en 53 fremdaj lingvoj, konstruas kunlaborajn rilatojn kun pli ol 40 transmaraj amaskomunikiloj kaj retejoj kaj formas markon en novaj mediataj aferoj, kiaj reta dialogo, retradio kaj poŝtelefona radio. Nun ĈRI jam fariĝis sinteza internacia amaskomunikilo kun vasta influo.

Ni firme kredas, ke la nova jaro 2009 estas jaro kun honoro, revo, defio kaj bonŝanco. Kaj Ĉina Radio Internacia plue prezentos al aŭskultantoj realan kaj malferman Ĉinion kaj kun aŭskultantoj kune konstruos harmonian familion kaj kreas novan epokon por Ĉina Radio Internacia.

Karaj aŭskultantoj, en la nova jaro ni prezentos al vi pli multajn kaj bonajn programojn. Ni esperas, ke niaj radio-programoj akompanos vin en ĉiu tago.

## Novjaraj saluto kaj bondeziroj el diversaj mondpartoj

Karaj amikoj! venis la nova jaro 2009. Antaŭ ĉio ni deziras feliĉan novjaron, sanon, sukceson kaj ĉion bonan al vi kaj viaj familianoj en la nova jaro! Ni kore dankas vin pro la subteno kaj helpo en 2008. Bonvole donu plu viajn daŭrajn subtenon kaj kunlaboron en 2009!

En la tuta ĵus pasinta jaro, venis al ni 7 885 korespondaĵoj je preskaŭ mil pli multe ol en 2007. Daŭre enhavoriĉiĝis niaj programoj kaj Mikrofone, kiuj pli kaj pli interesas niajn aŭskultantojn kaj legantojn. Ni povas diri, ke duono de tiuj sukcesoj apartenas al vi. Ni fieras, ke E-Redakcio havas tiel multe da fervoraj aŭskultantoj, kiuj amas nian elsendon kaj, malgraŭ diversaj malfaciloj, persiste kaj senlace subtenas nian laboron.

Okaze de la jarŝanĝo, flugis al ni belaj novjaraj kartoj kun elkoraj saluto kaj bondeziroj. Ni citu kelkajn:

Prezidanto de Granma Esperanto-Filio Rafael Cabrera Espinosa el Bajamo, Kubo, skribis en sia mesaĝo: “Okaze de la nova jaro 2009 en la nomo de Granma Esperanto-Filio el Kubo, mi salutas kaj bondeziras al ĉiuj laboristoj el ĈRI. Ni ne aŭskultas ĈRI ĉar mankas ilo, sed almenaŭ s-ro Francisco Martínez Arzuaga ricevas la revuon MIKROFONE. Ni deziras fari kaj havi kontaktojn kun aliaj esperantistoj el diversaj mondpartoj kaj ankaŭ bezonas, ke vi sendu al ni Mikrofone. En Bajamo estas esperantaj amikoj kaj mi deziras al vi feliĉon, sukceson kaj sanon en la nova jaro.”

Jiri Patera el Ĉeĥio skribis en sia letero: “Proksimiĝas la fino de la jaro 2008 kaj mi deziras al vi kaj viaj familioj ĉion bonan en la nova jaro 2009, firman sanon kaj konstantan prosperon al vi kaj al via patrujo, la granda Ĉinio!”

Leopold Patek el Aŭstrio esprimis en sia gratulmesaĝo: “Malgraŭ la 44-a jariĝo de la Esperanto-elsendo ne estas jubilea, tamen vi elsendis tre interesan specialan programeron, nome interparolon kun la prezidanto de UEA prof. Probal Dasgupto. Dankon pro la interparolo! Ĉar tiu ĉi interparolo estas ege interesa por ĉiu Esperanto-parolanto.”

Kazimiro Krzyżak el Pollando skribis: “Okaze de la nova jaro 2009 mi kore deziras al la tuta simpatia Esperanta Redakcio de Ĉina Radio Internacia bonan sanon, multe da prospero, feliĉo, ĝojo, kontento kaj rido dum ĉiuj tagoj, precipe multe da sukcesoj en disvastigo de la bela ideo por proksimigi ĉiujn homojn en la tuta mondo per bela, facila kaj neŭtrala lingvo – Esperanto.”

S-ro Jorma Toropainen el Finnlando skribis en la letero: “La baldaŭ finiĝonta jaro certe estos tre grava por vi ĉinoj. Precipe la Pekinaj Olimpikoj estas vere bone aranĝitaj kaj proksimigas vian popolon kaj la ŝtaton al ĉiuj anguloj de la mondo. Gravan rolon faras ĈRI kaj via Redakcio! Ŝajnas, ke pli kaj pli grava same kiel via revuo Mikrofone por nia E-Movado.”

Jerzy Dryja el Pollando skribis en sia letero: “Mi sendas al via tuta

teamo la plej elkorajn salutojn kaj bondezirojn okaze de la 44-jariĝo de E-elsendoj de Ĉina Radio Internacia.”



Prosperan novjaron kaj bondezirojn deziris ankaŭ Albert Reiner el Aŭstrio, Antoon Afschrift el Belgio, Alice Amalia Klein el Brazilo, Konstantin Katsarov kaj s-ino Cveta Popova el Bulgario, Jindřich Tomášek el Ĉeĥio, Alain Chalm, Fay Marcel kaj Jean Mourier el Francio, Tobias Meisner kaj Hans Jaukowski el Germanio, Molnár László kaj Barkanyi Istvan el Hungario; Mario Amadei el Italio, Hideki Harada kaj 市村志郎 el Japanio; Bak Giwan el Korea Respubliko, Tony Sar el Maroko; Luit Staghouver el Nederlando, Jan Skiba, Stepinski Zbignied, Urszula Mokrzycka kaj Marian Laba el Pollando; Olah Judit el Rumanio, Loginov Nikolay, George Eŭgeno kaj Galina Baĥtereva el Rusio, Milorad Djurdjeviĉ el Serbio, Honore Sebuĥoro el Ugando kaj multaj aliaj. Ni dankas ĉiujn bondezirantojn kaj reciprokas la samon.

# Saluto kaj bondeziroj okaze de la Printempa Festo

La 26-a de januaro estis la unua tago de la plej grava tradicia festo de la ĉina popolo – la Printempa Festo. De la 25-a de januaro, ĉinoj ĝuas 7 feriojn. La kuranta jaro estas la jaro de bovo. Antaŭvespere de la Festo, ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao venis al Jingtangshan, revolucia sankta loko en la provinco Jiangxi, por viziti lokajn kadrojn kaj popolamasojn; ĉefministro Wen Jiabao veturis al la tertreme plagita regiono en la provinco Sichuan kaj donis festan bondeziron al lokaj popolanoj.

Laŭ ĉina legendo en la lasta tago de jaro, monstro damaĝas homojn. Por pace pasigi la tagon homoj devas alpreni diversajn manierojn, ekzemple vesti sin per ruĝaj vestoj kaj bruligi krakilojn, por elpeli la monstron. Diversalokaj popolanoj de Ĉinio varme celebras la Printempan Feston per enhavoriĉaj aktivadoj. Laŭkutime, okaze de la Festo, ĉinoj faras ĉiujn klopodojn por reveni hejmen el diversaj lokoj kaj kolektiĝi kun siaj familianoj malgraŭ diversaj malfaciloj. Ankaŭ kelkaj niaj kolegoj forveturis por ĝoja renkontiĝo.

Estas menciinde, ke antaŭ kaj dum la Festo multaj aŭskultantoj sendis leterojn kaj mesaĝojn kun

saluto kaj bondeziroj al ni kaj la tuta ĉina popolo. Estas granda surprizo, ke nia amiko Amin Najmi el Maroko sendis gratulmesaĝon en la ĉina lingvo. Li skribis: "Mi ĝojas kune kun vi pro baldaŭa alveno de via grava tradicia festo – la Printempa Festo. Mi eĉ povas imagi, ke ĉie en Ĉinio regas densa varma festoetoso: Okulfrapas ornamitaj ruĝaj lanternoj kaj rubandoj, en urboj kaj en la kamparo videblas gluitaj ruĝaj versparoj kaj vortoj 'feliĉo' kaj gajaj geknaboj kun novaj vestoj petardas. Nuntempe mi sentas kaj ĉagrenon kaj ĝojon. La ĉagreno venis el tio, ke mi ne estas ĉino kaj ne povas sperti la ĝojan senton; mi samtempe ege ĝojas, ke mi estas via amiko, kiu amas la ĉinan popolon kaj interesiĝas pri la kulturo, kutimoj kaj moroj de la ĉina nacio. Nun mi serioze lernas la ĉinan lingvon por bone koni la longan historion kaj antikvan kulturon de Ĉinio. Mi elkore deziras al la 1,3 milirado da ĉinaj amikoj ĝojan feston kaj ĉion bonan en la nova jaro!"

Ĉeĥa aŭskultanto Jindřich Tomášek skribis en sia mesaĝo: "Kiel mi informiĝis, do morgaŭ, la 26-an de januaro, 2009, komenciĝos la nova ĉina jaro laŭ la ĉina



lunkalendaro. Do, la jaro de la bovo, kiu sekvas la ĝisnunan jaron de la muso.

"Okaze de via Printempa Festo kaj komenco de nova jaro de bovo mi havas la plezuron saluti vin kaj bondeziri al vi firman sanon, grandan feliĉon, konstantan prosperon kaj daŭran pacon por vi ĉiuj kaj viaj familianoj.

"Mi samtempe dankas vin pro via laboro favora al Esperanto. Viaj ĉiutagaj elsendoj en Esperanto, malgraŭ ke mi ne ĉiutage povas aŭskulti ilin, kiuj estas tre bonaj kaj valoraj. Mi firme deziras, ke ili daŭru ankaŭ dum la tuta jaro 2009!"

"Certe vi jam kiel kutime gluis bildojn sur muro, pordo aŭ fenestro de viaj domoj kiel ornamon. Almenaŭ mi opinias, ke la novjaraj bildoj ankoraŭ estas vaste ŝatataj en Ĉinio, kvankam ili kompare al historiaj tempoj senĉese progresas sur la



tradicia bazo kaj elspiras pli da odoro de la moderna socio."

Lagutenkov Igor el Rusio skribis: "Mi elkore gratulas vin okaze de Printempa Festo kaj deziras al vi la prosperon kaj feliĉon en Jaro de Bovo!"

Hans-burkhard Dietterle el Germanio esprimis: "Mi gratulas vin por la plej solena tradicia festo de Ĉinio, la Printempa Festo, kaj deziras al vi sanon kaj feliĉon.

"Mi esperas, ke vi povos rekolektiĝi en la lasta tago laŭ ĉina tradicia kalendaro kun viaj familianoj kaj bonvenigi la Novan Jaron."

Tobias Meissner el germanio skribis: "Je la nova jaro al vi ĉiuj

- antaŭ kaj malantaŭ la mikrofono - miajn elkorajn plej bonajn dezirojn."

Saluton kaj bondezirojn sendis ankaŭ prezidantino de Franca Fervojist

Esperanto-Asocio

Sylviane Lafargue, Peva Houdova, Viktor kaj Libuše Dvorak el Ĉeĥio, Marc Cuffez el Finnlando, Andre Maurice el Francio, Edeltraut Henning el Germanio, Vandad Imani el Irano, geedzoj Marija kaj



Branko Repac kaj Dinko Matkovic el Kroatio, Marian Laba, Urszula Mokrzycka kaj Henryk Zykowski el Pollando, Donald Gasper kaj multaj aliaj. Ni kore dankas ĉiujn bondezirantojn.

## Ĉinio firme batalas kontraŭ sekeco

Vintre de la pasinta jaro ĝis la ĉi-jara komenco, en granda norda parto de Ĉinio okazis serioza sekeco nevidebla en la lastaj 50 jaroj kaj Ĉinio alprenis multajn rimedojn por plenforte

praktiki kontraŭsekecan laboron. Ĉina ĉefministro Wen Jiabao faris inspekton kaj gvidis kontraŭsekecan laboron en la provinco Henan, meza Ĉinio. Li montris, ke oni devas plenforte redukti perdon el la sekeco ĝis minimuma grado por riĉa rikolto

de somera greno.

Laŭ statistiko, la areo de agrikulturaj plantaĵoj, suferantaj sekecon, superis 10 milionojn da hektaroj. Pro tio Ĉinio urĝe ekfunkciigis scienc-teknikan agon kontraŭ la sekeco.

Laŭinforme, ĝis la 6-a de februaro, la registaroj centra kaj diverslokaj investis pli ol 3 miliardojn da juanoj por rezisti al la sekeco. Nun la laboro alportis evidentan efikon.



## Ses proponoj de Hu Jintao por antaŭenpuŝi rilatojn inter du bordoj

La 31-an de la lasta decembro, en Pekino okazis kunsido memora al la 30-a datreveno de la publikiĝo de Mesaĝo al Samlandanoj en Taiwan. Ĉeestante al la kunsido, ĝenerala sekretario de la Centra



Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ŝtata prezidanto Hu Jintao elmetis 6 gravajn proponojn por

antaŭenpuŝi la pacan disvolviĝon de la rilatoj inter la du bordoj de la markolo Taiwan.

La ses proponoj estas: observi la principon pri unu Ĉinio kaj akceli la politikan interfidon; antaŭenpuŝi la ekonomian kunlaboron kaj akceli la komunan evoluadon; disvolvi la ĉinan



kulturon kaj plifortigi spiritan ligilon; oftigi la kontakton inter personoj de la du bordoj kaj vastigi la interŝanĝon inter diversaj rondoj; protekti la ŝtatan suverenecon kaj interkonsiliĝi pri aferoj koncernaj al fremdaj landoj; fini antagonisman staton kaj atingi pacan interkonsenton...

Li diris ankaŭ, ke opono kontraŭ secesiaj aktivadoj de "taiwan-a sendependigo" estas la necesa kondiĉo por antaŭenpuŝi la pacan disvolviĝon de la rilatoj inter la du bordoj kaj ankaŭ la komuna devo de samlandanoj de la du bordoj.

## Ekstartis "tri kontaktoj" inter la du bordoj de la markolo Taiwan

En la 15-a de decembro, 2008, oficiale startis la rektaj aer-navigado, mar-navigado kaj rekta poŝtado inter la du bordoj de la markolo Taiwan. La ĉiuflanka startado de la "tri kontaktoj" markas, ke la dubordaj rilatoj iris en la novan epokon de paca disvolvado.

Tiutage, en Ŝanhajo okazis la malferma ceremonio de dudirekta kaj rekta flugado inter la du bordoj de la markolo Taiwan; en Tianjin okazis la ceremonio de la unua rekta mar-navigado inter la du bordoj de la markolo Taiwan, kaj en Pekino okazis rektpoŝta ceremonio.



## La du grandaj pandoj atingis novan hejmon en Taibei

Vespere de la 23-a de decembro, 2008, Tuantuan kaj Yuanyuan, la pandoj donacitaj de la ĉeftero, atingis novan hejmon - Taibei-an Zoon.

Je la 14-a horo, post simpla kaj solena ceremonio, Tuantuan kaj Yuanyuan ekflugis de la flughaveno Shuangliu en la urbo Chengdu al Taiwan kaj proksimume je la 17-a horo kaj 10 minutoj atingis la flughavenon Taoyuan en Taibei. Poste ili atingis la zoon.





# Ĉinio difinis ekonomian kreskon je 8%



Marte okazis en Pekino la 2-a sesio de la 11-a ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj la 2-a sesio de la 11-a Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. La du sesioj estas du gravaj eventoj en la politika vivo de la ĉina popolo. La 5-an de marto inaŭguriĝis la 2-a sesio de la 11-a ĉina Tutlanda Popola Kongreso.

En inaŭguro, ĉina ĉefministro Wen Jiabao faris raporton pri la registara laboro al ĉirkaŭ 3 000 reprezentantoj de la Kongreso. La raporto kun proksimume 20 000 ideogramoj montris eksplicite per faktoj kaj statistikoj la fidon kaj kapablon de la ĉina registaro trakti la internacian finanĉan krizon kaj teni rapidan disvolvon de la ĉina ekonomio en la kuranta jaro. Wen Jiabao diris: "Ne ŝanĝiĝas stato kaj bona tendenco de ekonomia kaj socia disvolvo de Ĉinio. Ni tute havas fidon, kondiĉojn kaj kapablon konkeri malfacilojn kaj venki defiojn."

Fakte la fido de la ĉina registaro venas de evidentaj fruktoj akiritaj en ekonomia kaj socia disvolvo en 2008. Malfavore influite de evidenta malrapidiĝo de tutmonda ekonomia kresko kaj grandega sismo okazinta en Sichuan en 2008, la ĉina ekonomio ankoraŭ tenis rapidan kreskon. Malneta enlanda produktovalorlo pasintjare sumis je pli ol 30 000 miliardoj da juanoj, pliiĝante je 9% ol tiu en 2007.

La fido venas ankaŭ de pozitivaj efikoj en trakto de internacia finanĉa krizo. En la fono de ekspansiiĝanta internacia finanĉa krizo, la ĉina registaro plenumis pozitivajn finanĉajn politikojn kaj taŭge lozajn privalutajn politikojn, kaj ellaboris planon pri investo de 4 000 miliardoj da juanoj. Wen Jiabao laŭfakte informis, ke pozitive efikas tiuj politikoj kaj plano.

La fido de la ĉina registaro klare enkorpiĝas en celo de ekonomia kresko en 2009. La ĉina registaro ankoraŭ difinas ekonomian kreskon je 8%, kiu estas aspirebla sed ne atingebla por multaj aliaj landoj, precipe en la fono, ke la ĉina ekonomio kreskis nur je 7% en la lasta trimestro de 2008 kaj multaj ekonomieaj potencaj landoj prognozis seriozan dekadenciĝon de la enlanda ekonomio. Tio kategorie montras fidon kaj decidvolon de la ĉina registaro teni rapidan ekonomian kreskon.

La ĉina registaro ankoraŭ difinis

ekonomian kreskon je 8%, malgraŭ ja neniam trafita malfaciloj kaj defioj, kiuj aperis el la ankoraŭ ne finiĝinta internacia finanĉa krizo kaj daŭra ŝrumpo de la



monda ekonomio. Wen Jiabao diris: "Mi substrekas, ke la celo kreskigi malnetan enlandan produktovaloron je 8% estas elmetita post ampleksa konsidero pri bezono kaj ebleco. Evoluanta lando kia Ĉinio kun 1,3 miliardo da loĝantoj devas teni iagradan kreskon de ekonomio, se ĝi volas grandigi enoficigon, pliiĝi enspezon de loĝantoj kaj protekti socian stabilecon. La celo eble realiĝos post efika plenumo de taŭgaj politikoj kaj rimedoj."





## Shen Chengru: Nia kara lingvo, al kiu ni kontribuas la tutan vivon!

S-ro Shen Chengru naskiĝis en 1926, lia edzino Wang Yuchun 1934, ili nun respektive aĝas 83 kaj 75. La geedzoj ektuŝis Esperanton en 1984, ekde kiu jaro ili neniam forlasas Esperanton sed kontribuas sin al la kara lingvo dum sia tuta vivo.



**Mikrofone:** S-ro Shen Chengru, kial vi lernis Esperanton?

Shen Chengru: Tio estas tre interesa rakonto. Ĉu vi povas imagi, ke mi unue fariĝis instruisto de Esperanto kaj poste lernis ĝin? Somere de la jaro 1984, pli ol 30 ĉinaj sciencistoj kune skribis al gvidantoj de Ĉina Akademio de Sciencoj kaj proponis establi Esperanto-Asociacion kaj organizi sciencistojn lerni Esperanton por fari efikan internacian interfluan pri scienco. Tiam estis primara periodo de ĉinaj reformado kaj malfermo, homoj soife deziris tuŝi eksteran mondon. En la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento, Esperanto estis ege populara en Ĉinio, oni opiniis, ke ĝi estas efika ilo por fari internacian komunikadon kaj interŝanĝon. Ja pro tio, tiamaj gvidantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj akceptis la proponon kaj decidis establi Esperanton-Asociacion en la akademio kaj okazigi Esperanto-kursojn. Ĉio estis preta krom instruistoj de Esperanto. Neatendite mi estis elektita kiel instruisto de Esperanto, dume mi neniam tuŝis la lingvon. Do mi instruis Esperanton memlernante. Ekzemple, hodiaŭ mi instruis tion kion mi memlernis hieraŭ. Post organizo de la Asocio, mi kaj mia edzino estis respektive difinitaj kiel vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario.

**Mikrofone:** Kial la Ĉina Scienca Akademio elektis vin kiel instruiston de Esperanto, se vi ne scipovis la lingvon? Ĉu tiam ne estis esperantistoj en Pekino?

Shen Chengru: Ĉar tiam mi estis ununura homo en Ĉina Scienca Akademio, kiu scipovas la anglan, hispanan, francan kaj germanan. Do, mia estro havis

plenan fidon al mi instrui Esperanton memlernante. La realo montris, ke la kurso estis sukcesa. Ĉar miaj kolegoj, la sciencistoj almenaŭ scipovas la anglan lingvon, do ili lernis Esperanton rapide kaj kun granda interesiĝo. Pro sukcesoj de la Esperanto-kursoj kaj Esperanto-Asocio de Ĉina Scienca Akademio, pli multaj homoj el diversaj lokoj kun diversaj profesioj venis por lerni Esperanton. Aŭdinte la informon, s-ro Li Weilun, profesoro de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato venis por helpi nin instrui Esperanton.

**Mikrofone:** Kion vi faris per la lingvo kaj por la lingvo post lernado de Esperanto?

Shen Chengru: En 1985, nia Asocio eldonis revuon nomatan Monda Scienco kaj Tekniko, mi estis ĉefredaktoro. La revuo estis eldonataj 4 fojojn ĉiujare en Esperanto kaj la ĉina lingvo. En ĝi troviĝas artikoloj kaj disertaĵoj, kiuj ĉefe rilatas al natura scienco. Enhavo de la artikoloj de disertaĵoj tuŝas fizikon, kemion, astronomion, geografion, matematikon, medikamenton, mediprotekton, akvoutiligon, interreton kaj aliajn kampojn. Multaj sciencistoj ĉinaj kaj alilandaj sendis kontribuon al nia revuo. La revuo ĉesis en 1998 kaj ĝis tiam ni publikigis sume 930 artikolojn kaj disertaĵojn. Por glori la revuon pro ĝia kontribuo al internacia komunikado kaj internacia Esperanto-movado pri scienco kaj tekniko, en la jaroj 1994 kaj 1993, Grabovski-Internacia Fonduso de Pollando kaj alia internacia fonduso de Germanio donis al la revuon premiojn. Mi memoras, ke julie de 1987, mi partoprenis en Internacia Medicina Esperanto-Kongreso, prelegis pri disvolviĝo de ĉina medicino kaj akiris premion de Nikolao Koberniko.

Wang Yuchun: Krome, mi kaj mia edzo organizis 5 internacajn akademiajn kongresojn per Esperanto—Internacia Scienca kaj Teknika Kongreso de Esperanto respektive en 1986, 1998, 1990, 1994 kaj 1996. Ĉiujfoje ĉirkaŭ 300 ĝis 500 esperantistoj partoprenis en la kongreso kaj komune faris interŝanĝojn rilate al sciencaj problemoj. La organiza laboro estis ege laciga, detala kaj komplika, tamen tiam mi estis juna kaj energiplena, servante al Esperanto mi ĉiam estas ĝoja!

**Mikrofone:** En 2001, vi vizitis Francion, Svislandon kaj Germanion. La vojaĝo certe estis tre interesa kaj mirinda, ĉu ne?

Shen Chengru: Kompreneble jes, la vojaĝo estis mirindega kaj neimagebla. Mi resumis la vojaĝon en kelkaj numeroj: en 3 monatoj, ni vojaĝis al 47 urboj de 3 landoj, tranoktis en hejmoj de preskaŭ 60 esperantistoj kaj

hoteloj, vizitis 57 Esperanto-societojn kaj aliajn organizojn kaj 65-foje faris prelegon kaj demonstradon. En ĉiu tria tago ni ŝanĝis lokon. Iafoje, tuj elvagoniĝinte, ni direktis nin al kunvenejo ne havante tempon mendi hotel-ĉambron. Aliffoje ni devis fari plurajn prelegojn en unu tago. Tiam ni ambaŭ estis ĉirkaŭ 70-jaraj. Niaj eksterlandaj samideanoj admiris nian energion por tiel streĉa laboro. Nun jam pasis preskaŭ 8 jaroj, tamen rememorante la tri-landan vojaĝon, mi kaj mia edzino ĉiam estas ekscititaj. Ĉi tie ni elkore atribuas nian sukceson en la turneo al franca esperantistino Marie-France Conde Rey. Dank' al ŝia helpo ni sukcese kontaktis 40 francajn Esperantajn organizojn kaj klubojn. Ŝi ankaŭ faris detalan planon por nia vojaĝo, kopiis kaj disdonis la tekston de nia prelego, kaj krome ŝi helpis nin aĉeti biletojn por trajn-veturado en Francio, tiel ke nia vojaĝo estis senproblema.

**Mikrofone: pri kio temas pri la 65-fojaj prelegoj kaj demonstradoj?**

Shen Chengru: Laŭ propono de tri-landaj esperantistoj ni prelegis ĉefe pri kontribuoj de la ĉina tradicia kulturo al la homa civilizacio, studo pri la rilato inter cerba scienco kaj inteligenteca disvolviĝo, la scienc-teknika progreso de la nova Ĉinio, ĝia ekonomia disvolviĝo kaj granda ŝanĝiĝo de la vivo de ĝia popolo en la pasintaj 50 jaroj, sanprotektado de antikvaj ĉinoj, kaligrafio kaj pikturo de ĉina stilo kaj tiel plu. kelkfoje, ni kantis aŭ prezentis memsanigajn metodojn. Multaj montris ŝaton al la tradicia ĉina kulturo. En Normandio de Francio ni renkontis veteranan esperantistinon, kiu havas francan version de la klasika ĉina verko "Yi Jing" kaj verkoj de antikvaj ĉinaj poetoj.

Wang Yuchun: Preskaŭ ĉiufoje post nia prelego iuj iris sur la podion por rigardi nian ekspozicion sur muro, aliaj petis de ni pentraĵojn kaj kaligrafiajn kiel memoraĵojn kaj triaj faris skribaĵon en nia kajero. S-ino Jossette Ducloyer de Quimper en la nomo de sia tuta familio skribis: "Dank' al vi karaj ĉinaj geamikoj, ni konas pli multe pri Ĉinio kaj la tuta urbo pri Esperanto, la tutan vivon ni memoras pri nia komuna amikeco." Ĉie, kie ni estis ni sentis la ekziston de nia lingvo Esperanto. Gvidantoj de lokaj Esperanto-organizoj, emeritoj, veteranaj esperantistoj kaj multaj aliaj senegoisme laboris por nia lingvo. Nian prelegon aŭskultis urbestroj kaj parlamentanoj de 7 urboj kaj ĝin raportis ĵurnaloj de 14 urboj.

**Mikrofoje: Ĉu vi ankoraŭ havas kontakton kun la amikoj, kiujn vi konis dum la tri-landa vojaĝo?**

Shen Chengru: Bedaŭrinde, multaj jam perdis kontakton. Tamen mi ankoraŭ klare memoras iujn el ili. Ili estas Dennis Serge Clopeau, Jacques Joquin,

Jacques Ravary kaj Claŭde Gacond, kiuj nin veturigis kaj akompanis nin en la vizito. Manjo Clopeau kaj Jossette Ducloyer ofte akompanis nin al bazaro, librejo kaj lernejoj. Louise Rigault kaj Babi Treanton instruas Esperanton jam de sia juneco kaj neniam pagigis la lernantojn. Laura Viellefond estas jam 80-jara, tamen ankoraŭ penas por baki junajn esperantistojn. Isabelle Martinez kaj Gisele Gizard sekvis nin al pluraj urboj por aŭskulti nian prelegon. Ankaŭ la Esperanto-avo Leo Robert kaj svisa erudiciulo Giorgio Silber multe helpis nin.

**Mikrofone: Mi aŭdis, ke vi donacis multajn librojn kaj ĉiu-tagajn vivaĵojn al amikoj kaj esperantistoj.**

Wang Yuchun: Jes, ĝuste! Ni donacis preskaŭ ĉiujn librojn ĉin-lingvajn, kaj Esperantajn al amikoj, kiuj volas havi. Nur restis kelkaj, kiuj ni ankoraŭ ne finlegis. Krome, ni ankaŭ donacis vestaĵojn, ĉiu-tagajn vivaĵojn kaj manĝaĵojn al aliaj. Se vi estos en nia aĝo, vi povos kompreni nian agadon. Nuntempe mi estas 75-jara, mia edzo 83, kiom da jaroj ni vivos? Kion ni forportos post nia forpaso? Kompreneble nenion! Ni do donacis ilin al amikoj, kiuj bezonas.

**Mikrofone: Laŭ mi, vi kaj s-ro Shen ambaŭ faras bonege, kaj s-ro Shen eĉ komencis naski nigrajn harojn! Ĉu vi havas apartan rimedon por teni sanon?**

Shen Chengru: Mi pensas, ke ĝojo estas la plej grava. Mi subtenas ĉion kion mia edzino persistas. Do, mi ĉiam estas ĝoja kaj trankvila. Krome, mi ŝatas belkantadon kaj de tempo kaj tempo kantas. Krome, mi ŝatas ĉinan tradician pentraĵon kaj ofte faris pentradon. Mi kelkfoje donacis miajn pentraĵojn al alilandaj Esperanto-Asocioj por fari ekspozicion kaj kontribuis ĉiun koston de miaj pentraĵoj al Asocio por Esperanto-movado.

Wang Yuchun: Krome, mi inventis gimnastikon konforman al maljunuloj. Ĉiu-matene mi kaj mia edzo kune ekzercis. Mi estas iom malpacienca, parolas rapide kun alta voĉo, tamen Shen ĉiam estas milda, silenta kaj ĉiam ridetas babilante. Ni do karaktere kompletigas unu la alian. Fakte estas malfacile kune vivi ĝis la nuna aĝo, ni do dankas unu la alian kaj kompreneble nian karan lingvon Esperanton, kiu ĉiam donas al ni ĝojon, kortuŝon, kaj energion!





## Tra la Mondo – 世界各地

### Alvoko el Hiroŝimo, okaze de la Internacia Virina Tago, 2009

Okaze de la Internacia Virina Tago de UN, 2009, ni, virinoj de 20 organizoj el minicipo Hiroŝimo, havos kunvenon en la 8-a de marto sub la temo: Vivo kaj kulturo, protekti vivon de infanoj kaj kune vivi en familio.

La vivo de infanoj kaj geknaboj estas minacata de milito kaj konflikto en la mondo sub ekonomia krizo. Ekde jarfino de 2008, bombado atakas Gaza, Mezoriento, kaj viktimiĝas multaj infanoj kaj doloras nia koro.

Sub milito, konflikto kaj ekonomia krizo, rajtoj de infanoj, libere vivi, estas forrabitaj. Infana vivo dronas en malstabileco pro diversaj kaŭzoj.

Granda deziro de ni virinoj estas protekti kaj flegi la vivon de infanoj.

Ni alvokas pacon kaj interŝanĝas solidarecan mesaĝon tutmonde.

*Nobumasa Tieko*

(Laŭ statistiko kaj komento de s-ino Taeko OSIOKA, ĝis la 12-a de februaro, oni ricevis 161 Mesaĝojn el 44 landoj.)

### Nova internacia mono kun portreto de Zamenhof

Laŭ informo de Daniel Salomon, direktoro de la Sennacia Banko, en decembro 2008, la Banko lanĉis



sian novan mondan monunuon: Kiel lanĉoferto, la monbiletoj estis vendataj laŭ la kurzo Y1000 por M100.

La evento okazis ĉe Arcus Project en Moriya en Japanio okaze de la Open Studio-ekspozicio. La desegnaĵo de la monbiletoj enhavas portreton de la inventisto de Esperanto Zamenhof sur la antaŭa flanko kaj helikon sur la malantaŭa. La devizo: "Unu Mondo, Unu Lingvo, Unu Mono" delikate aperas en la fono.

### Monumento al Esperanto en Zaragoza, Hispanio

Laŭ informo de KAE-Infomilo, la 13-an de decembro, 2008, en la Placo Esperanto de Zaragoza,



oni inaŭguris monumenton al Esperanto, konsistantan el piedestalo kun ŝildo kronita per metala strukturo, kiu reprezentas la terglobon. La ŝildo omaĝas la 100-an datrevenon de la fondo de la Aragona Esperanto-Societo "Frateco". La monumento estis financita per volontulaj

kontribuoj de lokaj esperantistoj.

### “Fek al Esperanto”

Vinilkosmo ĉiam tenas kun ni bonan kunlaboron. En la komenco de la nova jaro, ni ricevis la unuan hiphopan albumon 100% en Esperanto, eldonitan de fama hiphopa grupo, la Pafklik. La albumo konsistas el furorkantoj “Bum Bum Knabis”, “Nur Restas Tri Tagoj”, “Komerca”, “Fek al Esperanto” kaj aliaj sume 18 kantoj kun diversaj stiloj. Se vi aŭskultas, la albumo iĝos via drogo... Koran dankon al Vinilkosmo!

### Gdynia en Esperanto

Okaze de Zamenhofa Tago, la 15-an de decembro, 2008, oni inaŭguris urban retpaĝon de Gdynia en Esperanto kaj eldonon de turisma informilo “Promenadeto tra Gdynia”. Pli multe da informoj vi trovos je [www.gdynia.pl](http://www.gdynia.pl)

Dum la inaŭguro oni prezentis ekspozicion pri agado de la rondo kaj sukcesoj de la anoj la Esperanta Konversacia Rondo. La ekspozicion preparis membro de la Rondo, s-ro K. Krzyżak. La malfermo finiĝis per komuna kantado “Amiko mia, adiaŭ” !

*K. Krzyżak el Pollando*

### Vin atendas Esperanto-Klubo Pilzeno, Ĉeĥio

Esperantistoj de Pilzena Klubo invitas vin al la 8-a Populara Turisma Renkontiĝo en urbeto Plasy, okazonta de la 18-a ĝis la 21-a de junio, 2009. Ĉiuj estos bonvenaj.

Dezirantoj bonvole kontaktiĝu rete: [esperantoplzen@centrum.cz](mailto:esperantoplzen@centrum.cz).

*Vaclav Kapral*

### Post bjalistoka UK en Gdansko

La miljara mara ĉefurbo de Pollando, Gdansko plena de antikvaĵoj kaj vidindaĵoj, invitas vin al la interesa renkontiĝo titolita: Gdansko – la urbo de solidareco, de la 1-a ĝis 5-a de aŭgusto, 2009.

*Joanna Lipska*

### E-ekspozicio dediĉita al J. A. Komenio

La 7-an kaj la 23-an de februaro, 2009, okazis en Moravské Budějovice, Ĉeĥio, E-ekspozicio memore al Komenio (Jan Amos Komenský, latine Comenius, 1592 - 1670).



J. A. Komenio estis la unua, kiu ne nur motivigis bezonegon de komuna lingvo por Eŭropo, sed menciis ankaŭ principojn, ke tiu ĉi lingvo fariĝu ĝenerale akceptebla kaj facile lernebla, do alirebla al ĉiuj tavoloj de la homa socio. Komenio deziris, ke tiu ĉi lingvo ne estu privilegia nur por rondoj de la kleruloj, kiel estis liatempe latina lingvo. Sukcesa projekto de tiu neŭtrala lingvo estas sendube Esperanto, kiun oni povas uzi kiel serĉatan eŭropan lingvon, respondantan al ideoj de Komenio.

La aŭtoro de Esperanto estas d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu en julio de 1887 mem eldonis la unuan lernolibron de Esperanto. Ekde tiam oni sisteme plivastigas ĝian vortprovizon en ĉiuj klasikaj kaj novaj fakoj de la homa agado kaj publikigas ĝin en diversaj du- aŭ plurlingvaj vortaroj.

Per tiuj ĉi faktoj aranĝantoj de la ekspozicio deziris demonstri praktikan funkcion de Esperanto kiel la serĉata komuna eŭropa lingvo, motivigita de Komenio jam antaŭ pli ol 350 jaroj.

*Jindrich Tomíšek el Ĉeĥio*

### Zamenhof-parko en Berlin-Lichtenberg

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Ludviko Lazaro Zamenhof, Esperanto-Ligo Berlin proponas nomi la ĝis nun sennoman verdan areon, kelkajn metrojn for de la berlina Esperanto-Kulturdomo en la distrikto Lichtenberg de Berlino. En la 18-a de decembro, 2008, la urbodistrikta parlamento akceptis la proponon. Laŭ esploro de Johann Pachter, la berlina Zamenhof-parko estas la dua en la mondo. La unua estas en la nederlanda urbo Leeuwarden.

*El Esperanto-Infomilo*

## *Ciĉitaj Leteroj - 海外飞鸿*

### **Mesaĝo de prezidanto de Jokohama Esperanto-Rondo Mizro Iwaya el Japanio**

Ni ĉiam dankas vin pro via sendado de Mikrofone al nia rondo, kiel same pro via Esperanta radio-elsendo. Via gazeto ĉiam interesas nin per laŭmodaj novaĵoj. Ankaŭ Mikronovelo vekas nin kun sia sprita kaj mistera enhavo.

### **Letero de Jiri Patera el Ĉeĥio:**

Aŭdinte, ke via redakcio en la jaro 2008 ricevis 7 885 leterojn el la tuta mondo, mi eksentis grandan ĝojon, ĉar tio montras la grandan gravecon de via laboro. Sed samtempe mi havas kulposenton, ĉar mi apartenas al tiuj aŭskultantoj, kiuj nur malofte skribas al vi. (Fakte s-ro Jiri Patera regule kaj sufiĉe ofte skribas al ni.)

La revuo Mikrofone estas tre grava kaj utila, ĉar ĝi kompletigis la radiajn elsendojn. En la revuo mi povas vidi foton de redaktoroj kaj de aliaj gravaj personoj de Ĉinio kaj ankaŭ de la tutmonda E-Movado. Krome estas tie tre gravaj artikoloj

pri Ĉinio, informoj kaj leteroj de aŭskultantoj.

### **Mesaĝo de Molnár László el Hungario:**

Antaŭ ol mi respondos viajn sendaĵojn kaj leteron, permesu al mi reciproki viajn bondezirojn kaj deziri al vi ĉiuj multegajn sukcesojn en via privata kaj socia-laboreja vivo kaj daŭran sanegon por ke vi sukcesu akiri viajn planitajn celojn en futuro.

Viaj sendaĵoj kaŭzis al mi grandegajn ĝojojn, ĉar mi skribis nur artikolon, kelkajn rimarkojn pri la Pekinaj Olimpikoj, sed vi surprizis min kun amaso da donacoj. Ili ĉiuj aparte estas ege valoraj, entute memorindaj donacoj pri la bela pasinteco kaj espereble pri la pli bela futuro: Per Esperanto por la komunaj celoj!

La belegan dekoracian kuseneton mi metis sur la okulfrapan lokon de la sofollito de la tagĉambro. La kalendaro trovis lokon sur mia skribotablo. La forsenditajn numerojn de

Mikrofone mi uzas por informi miajn gelernantojn pri la novaĵoj, do Mikrofone por mi estas bonega, riĉenhava lernilo kaj informilo.

Kaj la aperigo de mia artikolfragmento en via revuo por mi kiel intelekta laborulo, komencinta la 41-an jaron de sia esperantistiĝo, estas la plej granda, multvalora donaco simple pro tio, ke vi tute komprenis miajn dezirojn: Atentigi pri viaj talenta popolo, kulturo kaj akiritaj pintaj teknikaj rezultoj. Dankegon!

Pri la konkursoj: Mi jam atendas kaj ŝatus partopreni ilin. Rilate al kunlaboro, mi klopodas helpi vian laboron kaj trovi eblecon kunlabori.

### **Letero de Vaclav Kapral el Ĉeĥio:**

Min surprizis via Mikrofone kun perfektaj kaj buntaj fotoj kaj interesaj artikoloj pri nia E-Movado kaj precipe pri la admirindaj sukcesoj de via lando. Mi admiras la klopodadon kaj oferadon de ĉinaj esperantistoj por plivastigi nian belan lingvon!

# Mikronovelo – 微型小说

## Verkisto kaj Knabino



Verkisto, verkisto norda;  
knabino, knabino suda.

La knabino legis ĉiun el la eldonitaj libroj de la verkisto. Ŝi ne preterlasis eĉ lian artikoleon publikigitan en gazeto. En legado ŝi ebris kaj sorĉiĝis. Leteroj, unu post alia, portis floran aromon el la suda landoparto kaj ŝian puran koron el universitato, rekte sur skribotablon de la verkisto.

Ĉu en mateno kiam la suno ŝajnis freŝa frago, ĉu en vespero en kiu lampolumo sunradie varmis, la verkisto absorbite legis leteron de la knabino aŭ skribis respondon al ŝi. Ĉiufoje, en tia okazo, li sentis elegantecon de kandela brilo kaj ardecon sur la vizaĝo. De tempo al tempo, fiksante rigardon al peoniaj floroj sur fenestra breto, li poezie divenis: "Tiu knabino certe estas tiom ĉarma kaj rava kiom la suda pejzaĝo!"

Pasis jam 2 jaroj kaj sufiĉe longis la anima kontaktado inter la verkisto kaj knabino, kiuj dume ne renkontiĝis nek vidis, eĉ en foto, unu la alian.

Laciĝinte en verkado, li elprenis ŝiajn leterojn. Lante li levis krajonon kaj skizis naivajn okulojn sur la dorso de manuskripta papero, sekve koketan buŝeton, delikatan nazon... fine elegantajn pikkalkanumajn ŝuojn. Jam tutan figuron, gracion kaj kleran, eĉ lotusa lago. Kaj ŝajnis al li, ke lin karesas dolĉa zefiro, klara lunbrilo kaj flora aromo, kaj li aŭdas birdajn trilojn. Subite li sentis akrecon el la oreloj kaj okuloj, kaj fonto da inspiriteco ŝprucis el lia kapo. Baldaŭ li daŭrigis la verkadon, instigitan de la nekonata suda knabino.

Foje li tre volis viziti ŝin. Unu vido jam sufiĉa. Tamen li ĉiam ege okupiĝis kaj lia tagordo tiom plenis, ke li devis rapide fini eĉ ennesesejan umon.

Foje li sonĝis, ke tiu estas ĝuste ŝi; kiam li vokas ŝin, ŝi rapide alkuras, tamen apenaŭ li atingas ŝin per la manoj, ŝi malaperas, kvazaŭ primavera zefiro. Kaj li vekigis, kaj ne povis reendormiĝi. Li sentis la koron pikata. Li jam ne povis sin regi.

Pasis pluraj tagoj en kiuj li, sentante sin freneziĝonta, apenaŭ dormis.

Li ekflugis al la rozplena sudo. Li senbrue venis al tiu universitato. Informiĝinte pri ŝia kieo, li rapidis tien kaj baldaŭ atingis ŝian ĉambron, kies pordo estis ne tute fermita kaj el kiu alŝvebis babilo kaj gaja kanto. Li iom lekis la sekecajn lipojn kaj levis la manon por frapi je la pordo. Tamen la mano tremadis en la aero, ĝis li foriris.

Sekvatage li revenis. Li skribis leteron por rakonti, kial li flugis suden; sed li ne frapis je ŝia pordo pro tio, ke li preferis fine ne vidi ŝin.

Post nelonge li ricevis respondon. Ŝi diris, ke fakte en tiu vespero ŝi stulte staris antaŭ lia hejmo, por lin renkonti je unu vido, nur unu; kaj por tio ŝi petis forpermeson; fine ŝi ne frapis je lia pordo; antaŭ ol foriri, ŝi plukis frondeton el la poto eĉ la perono de lia hejmo; ankaŭ ŝi pensis, ke ŝi prefere ne konu lin.

### Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

**Konstanta adreso:** Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

**Tel:** +86(10)68891940

**Fax:** +86(10)68891164

**Retadreso:** [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

**Retpaĝo:** <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Esperanto service, CRI-36

China Radio International

P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

Tel: +8610 68891940

+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retadreso: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉefredaktoro: Zhao Jianping

Redaktoroj: Wang Fang

Zhan Xuede

Xiao Henggang

